

## ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTAJ GEJUNULOJ EN KADRO DE LA  
MONDJUNULARA FESTIVALO EN VIENO la 28-an kaj 29-an de JULIO 1959

---

---

Laŭ la deziro de la esperantista junularo de la tuta mondo ankaŭ en Vieno oni aranĝis la renkonton de junaj esperantistoj en kadro de la Festivalo. La loko da la renkonto entis la urba sporthalo.

La 28-en de julio kunvenis 50 esperantistoj el 11 landoj. Ĉi tiun renkonton partoprenis reprezentantoj de Brazilo, Bulgario, Aŭstrio, Aŭstralio, Hungario, Okcidenta Germanujo, Japanujo, Jugoslavio, Nederlando, Pollando kaj Svedujo. Post la salutparoladoj okazis prelego pri la jena temo: "Kiel la esperantista junularo plej efike povus labori por la celoj de paco kaj amikeco". La prelegron faris s-ano S. Simeonov, bulgara delegito.

Posttagmeze oni diskutis la bazan prelegon pri la menciita temo. Unue la hungara delegito D-ro Imre Ferency parolis pri la laboro de la hungara esperantistaro, poste li daŭrigis pri la pluaj taskoj de la esperantista junularo, akcentante ke la junulara esperantista movado nepre bezonas internacian esperantlingvan gazeton. La partoprenantoj de la kunveno akceptis la rezolucion, kiun pretigis la bulgara delegitaro.

La 29-an de julio okazis la prezentado de esperantigitaj filmoj. Oni prezentis bulgarajn, hungarajn kaj aŭstralian filmojn. La filmoj estis laŭde akceptitaj.

Posttagmeze vienaj enperantistoj gvidis la eksterlandanojn tra bela Vieno. Vespere okazis internacia gaja vespero de esperantistoj en la salono da Bayrischen Hof.

La akceptita rezolucio akcentas la gravecon de la defendo de paco en la tuta mondo. La partoprenantoj de la renkonto "proponas al TEJO kunlabori pli aktive kun ĉiuj progresemaĵoj internaciaj kaj naciaj junularaj organizaĵoj rilate al la disvastigo kaj apliko de Esperanto, plifaciligado de la internaciaj junularaj rilatoj. "

Okae de la oficiala renkonto la bulgaraj kaj vienaj esperantistoj transdonis donacojn al la partoprenantoj. Laŭ la propono de la bulgara delegito D-ro Imre Ferency oni akceptis unuanime iniciaton saluti la kunvenon de TEJO en Gdańsk kaj la kunvenon de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) en kadro de la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio.

D-ro I. Ferenczy

15-a INTERNACIA JUNULARA KUNVENO de TEJO  
(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)  
Gdańsk - 25-31 de julio 1959.

---

La kunvenon partoprenis ĉirkaŭ 250 gejunuloj el 19 landoj. La programo konsistis el ĉiutagaj ekskursoj: tuttaga ekskurso per ŝipoj, vizito al la katedralo Oliwa, al urboj Sopot kaj Gdynia ktp. Estis organizita "Jugoslavia Vespero" kun tre ampleksa kaj altnivela programo. La Pola Radio surbendigis la tutan programon. Krom tio la ĵaz-orkestro junulara el Ljubljana estis invitita de la Pola televido al Gdynia kaj ĝi publike partoprenis la televidan programon.

En ĝenerala laborkunsido kaj tri komitataj kunsidoj estis decidite, ke venontjaraj kunvenoj estu nomataj kongresoj. Ankaŭ estis pritraktita la kongresa regularo.

Kiel presidanto de TEJO estis reelektita Günther Becker (Germ. ), kiel ĝenerala sekretario Nicola Minnaja (Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italio). Pri disvastigo de Esperanto inter la junularo de orientaj landoj zorgos la estrsrano Marek Pietrzak (ĉe Pola E-Junularo, Str. Garncarska 18, Gdańsk, Pollando). La Komitato de UEA en Varsovio decidis, ke TEJO rajtos oficiale ĉeesti la Festivalojn.

---

### *Konkurso de fajrero 1959*

PRO ANKORAŬ NEREVIZIITAJ TRADUKOJ (MODELOJ) NI DEVAS PROKASTIGI TIES PUBLIKIGON. LA PRITAKSA KOMISIONO KONSISTAS EL S-ANOJ J. POMYKACZ, V. KOČVARA, V. NOVOBILSKÝ, J. CINK, J. WERNER – REZULTOJ VENONTE.

44-a

1 – 8

U. K. *El la kongresa kajero*

AŬGUSTO

1959

■ (1. 8. ) Tutmondan Esperantan Ekspozicion malfermis pola vicministro de kulturo kaj arto Michal Rusinek. Finante li deziris al 1a Kongreso fruktodonajn debatojn, kaj disvolviĝon kaj venkon al la Esperanta movado. La ekspozicio en kuluaroj de Kongresa Salonego enhavis 300 lernolibrojn, 200 vortarojn, ĉirkaŭ 1000 librojn, premiitajn verkojn de la konkurso je manumento al Zamenhof kaj ankaŭ verkojn de Itala pentristo Eupremio Lo Martire.

■ (2., 8. ) La Kongreson inaŭguris la prezidanto de LKK, s-ro Andreo Rajski. Poste sekvis bonveniga parolado de pola ĉefministra Piotr Jaroszewicz: ". . . Ne estas sen kaŭzo, ke la ideoj de la Esperanta movado estas subtenataj de la pola registaro. Ili estas ideoj, kiuj celas ligi homojn de diversaj nacioj, de diversaj politikaj konceptoj kaj religioj, faciligi al ili la interkomprenon. . . "

■ La Kongreson partoprenis 12 registaraj reprezentantoj, nome el Belgujo, Ĉinio, Finnlando, Francujo, Germana Federacia Respubliko, Nederlando, Brazilo, Indonezio, Norvegujo, Svedujo, Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio. Preskaŭ ĉiuj reprezentantoj estis esperantistoj.

■ Rektoro de la Internacia Somera Universitato estis prof. D-ro Tadeusz Kotarbiński, prezidanto de Pola Akademio de Sciencoj kaj profesoro de Varsovia Universitato.

En kadro de la ISU okazis tiuj ĉi prelegoj:

2. 8. Prof. D-ro Paul Neergaard: "La lukto kontraŭ la malsato – ĝia internacia organizo".

2. 8. Lektoro Josip Vračić: "Estetika analizo de urbanisme–arkitekturaj karakterizoj de la urbo Dubrovnik".

3. 8. Marjorie Boulton: "Joseph Conrad – polo, kiu estis granda angla verkisto.

4. 8. Prof. D-ro Boĵ Popović: "Eblecoj kaj malfacilaĵoj por interplaneda vojaĝo".

4. 8. Prof. D-ro Andrzej Rzymkowski: "Mezepoka kaj renesanca pola arkitekturo".

3. 8. Prof. D-ro Hugo Sirk: "La centjara jubileo de la spektranalizo en 1959".

5. 8. D-ro Andreo Grebecki: "Centjareco de evoluismo".

7. 8. Prof. D-ro Giorgio Canuto: "Praktikaj aplikadoj de l' seksa diagnozo en ĉeloj".

■ (1-2. 8. ) La konferencon de Mondpaca Esperantista Movado partoprenis ĉirkaŭ 150 personoj el 17 landoj. Oni sendis telegramon al la konferenco de eksterlandaferaj ministroj en Ĝenevo pri solvo de la okcidentberlina demando.

■ (2. 8. ) Internacia Scienca Asocio Esperantista, en sia jarkunveno (46 p. el 18 landoj) plej atentis la fakajn lernolibrojn por studentoj kaj por pli vasta publiko. Ankaŭ penetro en altnivelan sciencan literaturon estas bezona, ĝi kontaktigas nin kun vasta scienca publiko. Estis substreki la granda malproporcio inter la ekzistantaj beletra kaj scienca literaturoj en Esperanto. Kun UEA oni klopdos solvi la problemon de interŝanĝado de Esperanta literaturo inter ĉiuj landoj senescepte.

■ (2. 8. ) "Verda Ĉaro de Julio Baghy". Pri ties prezentiĝo ni citas vortojn de red. T. Jung laŭ "Heroldo" n-ro 12: "Nur al PIGMALIONO mi volas dediĉi kelkajn vortojn aparte. Ĝia prezentado ree allogis al la Granda Salonego (Amfiteatro) la tutan kongresanaron. Plenumis tiun teatraĵon la "Verda Ĉaro de Julio Baghy", nia jam renomiĝinta esperantista teatra trupo el Prago, sub gvidado de ges-anoj Seemann (reĝisoro A. Slanina). . . . La geaktoroj dediĉis al la prezentado siajn plej bonajn talentojn kaj kapablojn, kaj la 3000–persona publiko dankis per ofta spontanea aplaŭdo. Elstaris precipe la ruĝhara Elisa Doolittle (Eva Seemannová), la knabino kun tre vulgara konduto kaj slango, kiu posta metamarfoziĝis je perfekta sinjorino. Ĝis nun postsonas en miaj oreloj ŝia terura kriaĉo, pri kies senmanka efektivigo ŝi certe studadis dum monatoj, kaj la slango ŝajnis en la Esperanta traduko trafe imitita. Per PIGMALIONO fine oni ĝuis tetraĵon modernan kaj samtempe komedian. Jen kion la kongresanaro dezias kaj ŝatas. "

■ (3. 8. ) Fakkunveno de Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj-Esperantistoj (32 p. el 12 landoj). Nia plej juna faka organizo akceptis la provizoran statuton kaj fiksas la programon. En la komitato estas ankaŭ ĉeĥo, ark. Jaroslav Hůda el Jihlava.

■ (3. 8. ) "La rolo de la Esperanto-Movado en la realiĝo de la granda projekto de UNESCO pri interŝanĝo de orienta kaj okcidenta kulturaj valoroj" estas nomo de la unua sekcio, kiu kunsidis sub prezidanteco de Prof. D-ro N. Kawasaki el Japanujo. - Oni projektas eldoni libroserion de 5 eŭropaj verkoj, 5 aziaj, inkluzive la verkon por festi la centjaron de hinda poeto kaj filozofo Rabindranath Tagore kaj antologion de

japana literaturo, 5 amerikajn venkojn kaj 5 verkojn el Afriko, Aŭstralio k. s. - Oni starigos somerajn lernejojn pri la temo en Bruselo 1960 kaj en Delhi 1962.

■ (3. 8. ) En la kunveno de Esperantista Ŝak-Ligo Internacia estis elektita d-ro Faigl el Ĉeĥoslovakio kiel redaktaro de aperonta ŝakrubriko en "Nuntempa Bulgario".

■ (3. 8. ) En la Kongresa Balo ludis du orkestroj: de la Pola Radio kaj esperantista junulara gaz-orkestro el Ljubljana (Jugoslavio). Esperantlingve kantis Carli Sfondini el Milano kaj Nevenka el Ljubljana. Post noktomezo dancis kaj prezentis bulgarajn popolajn dancojn en popolkostumoj la junulara grupo el Sofio, kiu kolektis tondrajn aplaŭdojn kaj laŭdojn de ĉiuj partoprenintoj.

■ (4. 8. ) AKADEMIO DE ESPERANTO okazigis publikan debaton "Diskuto pri geografiaj nomoj", kiun prezidis s-ro ing. Isbrucker, partoprenis pli ol 500 kongresanoj. S-ano Tibor Sekelj prezentis la bazajn principojn por kreo de mondmapo en la Internacia Lingvo. Tiu laboro daŭros plurajn jarojn, gvidos ĝin 6-membra komisiono de akademianoj kaj 6 anoj de Internacia Geografia Asocio. La diskuton, kiu sekvis, partoprenis 9 personoj el 6 landoj, inter ili la ambasadoro de Vietnamio en Moskvo, Nguyen Van Kinh.

■ (4. 8. ) Estis prezentitaj du polaj esperant-lingvaj filmoj: kolora filmo "Varsovio matene" kaj dokumenta filmo "Vidindaĵoj de Wroclaw".

■ (4. 8. ) En BELARTA KONKURSO partoprenis 88 verkoj el 20 landoj de 40 verkistoj el ĉiuj kontinentoj. 3 premiojn gajnis aktoroj belgaj, po 2 venis al Jugoslavio kaj Sud-Afriko, po unu al Italujo, Skotlando, Germanujo, Francujo, Ĉeĥoslovakio (J. Staněk el Praha gajnis la 3-an premion en la branĉo de originala poezio por la poemo "Ĉo-san, malgranda japana pupeto"). La premion por NOVA TALENTO ricevis Ŝandor Cszaszar (Hungario) kaj Juan Regulo Perez gajnis "Arĝentan Spronon" de la Eldonejo KOKO (Kopenhago) kaj estis proklamita "aŭtoro de la jaro". J. R. Perez verkas eseojn, kritikojn kaj mecene kuraĝigas multajn verkistojn en STAFETO.

■ (4. 8. ) Kunveno de la SOCIETO DE GEFRATOJ, S-ro D. P. Faux, redaktoro de "La Plugilo" kaj "The Plough", parolis pri grupoj de homoj en la nuntempo, kiuj volonte kunvivas en fratecaj komunumoj, laborante laŭkapable kaj ricevante laŭbezone. (!)

■ (5. 8. ) Okaze de la malkovro de memortabulo ĉe la domo de D-ro L. Zamenhof parolis unne la vicprezidanto de la Urba Konsilantaro kaj poste reprezentantoj de 5 kontinentoj. Al la strato Zamenhofa 5 venis multaj kongresanoj kaj varsoviaj. Wlad. Wit. Spsychalski: "Antaŭ 86 jaroj, kiam ekloĝis ĉi tie la familio Zamenhof kun 14-jara Ludoviko, neniu supozis, ke tiu fakto iam ligos ĉi tiun straton kaj ankaŭ la urbon Varsovio kun la historio de movado, kiu dume jam fariĝis tutmonda. . . "

S-ro Kho Kliwatliat el Indonezio: "En Azio, kie post la dua mondmilito fondiĝis novaj sendependaj ŝtatoj, prezentiĝas problemoj de lingva diverseco. . . Jam montris la praktiko, ke Esperanto estas facile lernebla por orientano samkiel por okcidentano, ke ĝi taŭgas kiel lingvo internacia. . . " -

Por Ameriko parolis s-ro Charles Peterson (USA).

Por Afriko s-ro Isaac Nassif el Unuiĝinta Araba Respubliko: "Multaj afrikaj kaj aziaj landoj sange batalis por akiro de sia libereco. Aliaj ankoraŭ luktas kaj baldaŭ atingos

la saman celon. Tiam, post kompleta liberiĝo de afrikaj kaj aziaj landoj Esperanto ekludos sian rolon rompante la lingvajn barojn. Mi antaŭvidas la tagon, kiam ambaŭ vekigintaj ludas sian rolon en la esperantista kampo de paco kaj feliĉo, por la tuta homaro. "

Por la aŭstralia kontinento parolis s-ro W. Hudson King el Nov-Zelando.

Fine, por Eŭropo, parolis nia kara Julio Baghy.

Pri Zamenhof li diris: "Al la formiĝo de lia interna mondo efikis la melankolia profundo de Chopin, ardanta patriotismo de Mickiewicz kaj tiu de Juliusz Slowacki kaj ankaŭ la turmenta sento de minoritata deveno. Samtempe li estis ankaŭ filo de Eŭropo, en kiu la humanismaj cel-difinoj de la XIX-a jarcento ĝermiĝis kaj ekfloris unueca eŭropa penso: krei nacian sendependecon, akceli internacian kulturlaboron kaj el katenoj de jarcentoj liberigi la homan dignon. . . Esperanto estas la lingvo de la homa solidareco, per kiu ni, vivantoj en la XX-a jarcento, en jarcento de atomforto, volas servi unuavice la kristaliĝon de pensoj pri sekura vivo kaj tutmonda paco por krei pli belan estontecon de novaj generacioj. "

■ (6. 8. ) EKSKURSO AL BIALYSTOK - naskiĝloko de D-ro Zamenhof. Ĉirkaŭ 600 kongresanoj kaj 2000 loĝantoj de Bialystok kolektiĝis en la placo inter stratoj Malmeda kaj Spoldzielozna. La prezidanto de Urba Konsilantaro s-ro Krochmalski salutis ĉiujn kaj esprimis sian esperon, ke unu el venontaj Universalaj Kongresoj okazos en Bjalistoko.

Prezidanto de UEA, Prof. D-ro G. Canuto diris pri fameco de la urbo Bjalistoko en la tuta mondo pro ĝia meritplena filo - D-ro L. Zamenhof.

Ambasadoro de Vietnamo en Moskvo, s-ro Nguyen Van Kinh tralegis la akton de la monumento al Zamenhof, kiu poste estis enmasonita en la fundamenton de la monumento.

Sur loko, kie staris antaŭ la milito naskiĝdomo de L. Zamenhof, estas novkonstruaĵo, en kies muron estis enmetita tabulo kun jena teksto:

"Ĉi tie staris la domo, en kiu la 15-an de decembro 1859 naskiĝis kreinto de la internacia lingvo Esperanto, D-ro Ludoviko Zamenhof".

Ankaŭ ĉe la lernejo je nomo de D-ro Zamenhof okazis solenaĵo. La vicprezidanto de la Urba Konsilantaro substrekis, ke la nova lernejo estas konstruata en kadro de la kampanjo "1000 lernejoj okaze de 1000-jara jubileo de Pola ŝtato". Li malkovris tabulojn enmasonitajn en muro de la lernejo. Ili portas jenan tekston en Esperanto kaj la pola lingvo:

"En la centjara datreveno de naskiĝo de D-ro L. Zamenhof - 6. XII. 1959".

En tiu ĉi lernejo estos instruata la lingvo internacia al ĉiuj gelernantoj. Du sesjaraj lernejknaĵoj pollingve salutis la Kongreson, esprimis sian fieron pro tio, ke Zamenhof naskiĝis en Bialystok, kaj promesis, ke ĉiu infano de ĉi tiu lernejo bone ellernos Esperanton.

■ (7. 8) GRANDIOZA AKCEPTO de la tuta kongresanaro en la Balaj Salonoj de la Kongresejo. Por tiu ĉi okazo ĉiu ricevis oficialan invitilon dulingvan: "Ministro vicprezidanto de Pole. Popola Respubliko Piotr Jaroszewicz invitas je akcepto okaze

de 44-a Universala Kongreso de Esperanto". - Plenbrila marmora interiero, senfinaj vicoj da tablegoj kovritaj per plej al lokaj bongustaĵoj. Ĉiu povis manĝi kaj trinki laŭplaĉe kaj laŭ apetito. - Oficiala akcepto ĝis nun certe la plej impona.

■ (8. 8. ) La prezidanto de la 45-a Kongreso, s-ro Maurice Jaumotte transprenas la tradician kongresan flagegon. La reĝo de Belgujo akceptis jam la altan protektorecon de la 45—a.

La prezidanto de UEA, Prof. G. Canuto deklaris la Kongreson finita. Leviĝo - kaj sonas ankoraŭ la himna melodio de la Espero. - La Kongreso estis manifestacia, ligita al 100-jara datreveno kaj postmilite plej multnombre vizitita de la orienteŭropaj kaj alikontinentaj landoj.

## ■ REZOLUCIO DE LA 44-a UNIVERSALA KONGRESO

La 44-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Varsovio de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1959 por memori la centjaran datrevenon de D-ro L. L. Zamenhof kaj partoprenita de 3256 reprezentantoj de la Esperanto-movado el ĉiuj partoj de la mondo

(1) DIREKTAS sian omaĝon al la lando, kiu donis al la mondo la genian aŭtoron de la Internacia Lingvo kaj esprimas sian dankon al ĉiuj aŭtoritatoj kaj institucioj, kiuj faciligis la okazigon de tiu ĉi impona manifestacio honore al la memoro de D-ro L. L. Zamenhof.

(2) KONSTATAS kun plezuro, ke la Internacia Lingvo faris konsiderindan progreson, disvastiĝis tr la tuta mondo kaj penetris en ĉiujn sociajn tavolojn, ke ĝi daŭre kaj progresive riĉigas per nova kultura enhavo, per multnombraj tradukoj el ĉiuj lingvoj kaj per la literatura kreado kaj scienca kreado originale en Esperanto, ke lernolibroj kaj vortaroj en Esperanto estas publikigitaj praktike en naciaj literaturaj lingvoj, ke, paralele kun la disvastiĝado, kun la kreskado de la beletra kaj scienca literaturo, kun la multobligado de la internaciaj kontaktoj inter la personoj, kiuj ĝin uzas, kaj ĝenerale paralele kun la vastiĝo de ĝiaj aplikoj en la praktiko, la lingvo interne tre evoluis, sed samtempe konservis kaj eĉ fortikigis sian unuecon kaj koherecon; ke sekve la Internacia Lingvo fariĝis nekontestebla socia fakto, internacie enradikiĝinta kaj matura por plua, multe pli vasta utiligo en la internaciaj rilatoj.

(3) MEMORIGAS, ke UNESCO per sia rezolucio de la 10-a de decembro 1954 rekonis, ke "la rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo respondas al la celoj kaj idealoj de UNESCO", kaj komisiis sian ĝeneralan Direktoron "sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo", ke per la sama rezolucio UNESCO konstatis la fakton, ke pluraj ŝtatoj deklaris sin pretaj "enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj kaj petis tiujn Ŝtatojn-membrojn informadi la ĝeneralan direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo".

(4) KONSTATAS, ke ek de la akcepto de tiu rezolucio en 1954 la lingva problemo en la internaciaj organizaĵoj kaj ĝenerale en la internaciaj rilatoj plue akriĝis pro la pligrandiĝo de la nombro de "oficialaj lingvoj", "pro la konstanta ampleksiĝado de la internaciaj rilatoj mem al novaj sferoj kaj pro la daŭre kreskanta nombro da personoj, kiuj ĉiam pli partoprenas en internacia komunikado de

internacia politiko kaj scienco ĝis la ordinara turismo.

(5) ESPRIMAS sian firman konvinkon, ke tiun lingvan problemon povas plene kaj juste solvi - sen avantaĝoj por unuj kaj sen humiligoj por aliaj - nur la neŭtrala kaj supernacia Esperanto, pruvita kiel perfekta instrumento de internacia komunikado dum pli ol 70 jaroj, kaj opinias, ke la plej efika metodo por plua praktika utiligo de la lingvo en la internaciaj rilatoj estas ĝia laŭgrada enkonduko en la lernejojn.

KONSIDERANTE TION la 44-a Universala kongreso de Esperanto

(I) ALVOKAS ĉiun registaron atente pristudi la eblecon organizi eksperimenton de paralela instruado de la Internacia Lingvo Esperanto en kelkaj lernejoj.

(II) REKOMEDAS al UEA kaj al la organizaĵoj apartenantaj al ĝi doni al ĉiuj internaciaj aŭ naciaj aŭtoritatoj sian plenan helpon por la realigo de tiu ĉi rezolucio. -

En Varsovio, la 8-an de aŭgusto 1959.

-----  
29-a INTERNACIA KONGRESO de BLINDAJ ESPERANTISTOJ okazis ankaŭ inter 1-8. VIII. en Varsovio. Partoprenis 62 personoj el la landoj. Al la riĉa programo kontribuis ankaŭ profesoro Krehniak el Brno, kongresa vicprezidanto.  
-----

4-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO. Partoprenis 40 infanoj 5-13-jaraj el 7 landoj. En la kongreseta hejmo en Varsovio - Bjelany estis marde la 4-an de aŭgusto akceptita vizito de la granda Kongreso - la gepatroj kaj pedagogoj kaj ĉiuj amikoj de infanoj. Post reciprokaj salutoj, deklamado, kantoj, dancoj la infanoj ludis kaj amuzis sin komune kun la gastoj. Fine estis supren forsenditaj balonetoj kun leteroj de la infanoj - Amika mesaĝo al la infanoj de la mondo.

## LA GRUPOJ en spegulo

### ANTARKTIDO – LA SESA MONDPARTO

estas titolo de vojaĝprelego, kiun aranĝis esperantistoj en Třinec. Prelegis s-ano M. Rudolf el Olomouc, la dua sekretario de Internacia Geografa Asocio. La prelegon, kompletigitan per bela unuhora kolorfilmo "Tra Antarktido", partoprenis (14. 9. ) pli ol 550 gelernantoj el la lernejoj kaj pli ol 350 laborantoj el Třinec kaj ĉirkaŭaĵo.

### E-RONDETO EL TŘINEC EN SLOVAKIO.

Esperantistoj el "Třinecké železářny" aranĝos dimanĉe la 11-an de oktobro aŭtobusan ekskurson al Žilina-regiono. Oni traktas kun esperantistoj el Martin kaj en Žilina pri komuna renkontiĝo. Vespere la ekskursantoj vizitos teatron en Žilina.

"RIGARDO EN BLINDULAN MONDON" povos esti nomita la programo aranĝita de la Tramista E-grupo en Ostrava en kunlaboro kun la Societo de nevidantoj (21. 9. ) la kulturalan programon recitan kaj muzikan sekvis demonstro de blindulaj helpiloj, aparatoj, presaĵoj kaj manlaboroj.

OSTRAVA SOCIETO DE NEVIDANTOJ fondos oktobre 1959 esperantistan rondeton. La iniciato venis de samideano K. Janouš, kiu ekkontaktis kun la societo. Instruos s-ano Fiala.

### ESPERANTISTOJ EN PORUBA, ATENTU!

Nia rondeto ĉe la Uzina Klubo de Bytostav en Poruba komencis sian postferian laboron per malfermo de eta ekspozicio, kies ĉelo estis interalie informi pri nia A-B-kursoj. La kursoj komenciĝis 15. 9. , sed la nombro de kursoj atestas, ke ni tamen propagandis malbone ambaŭ: ekspozicion kaj la kursojn. En Poruba staras flanke aro da spertaj esperantistoj, kiuj ne venis inter nin. Ni do frapetas sur la korojn kvazaŭ malmolajn kaj ĝojatendas la renkontiĝon ĉe ni! La Uzina Klubo subtenas nin kaj ni deziras per bona laboro montri ne nur al la U. K. , sed ankaŭ al ni mem, ke ni scias ne nur paroli pri paco kaj kunlabaro inter homoj, sed ankaŭ por ĝi fervore agi.

Ni kunvenas ĉiumarde je 18,30 en la Uzina Klubo. Post kurso ĉiam okazas programo (prelego, filmo, kantoj k. s. ) kaj fine en amika kunesto ni ludas societajn ludojn, montras niajn korespondaĵojn ktp.

Al adreso de la ceteraj grupoj ni vokas, ke ili pri siaj aranĝoj informu ankaŭ nin. Adreso: Závodní Klub Bytostav, esperantský kroužek, Ostrava 16 - Poruba.

Inform: Adámek

### AŬTUNA PROGRAMO DE ESPERANTISTOJ EN VŽKG.

Ĉiumerkrede je 19,30 h. en "Zámek", Ostrava-Vítkovice, Výstavní 97:

- |         |  |                  |
|---------|--|------------------|
| 2. 9.   | Libertempo en Rumanujo.                          | - A. Zdražilová  |
| 9. 9.   | Matematika gaja kaj serioza.                     | - J. Werner      |
| 16. 9.  | Internacia foiro en Brno.                        | - Dr. Kočvara    |
| 23. 9.  | Du gitaroj. - R. Wolkowinsky                     | - L. Piotrowski  |
| 31. 9.  | Bulgario, lando de rozoj kaj de Georgi Dimitrov. | - S. Hesapčiev   |
| 7. 10.  | Jarkunveno de la Esperanto-Fako.                 |                  |
| 14. 10. | Anekdotoj estas nia ĝoj'.                        | - ERINACO        |
| 21. 10. | Ekkonu vian patrujon! (kun. Lumbildoj)           | - Vl. Kočvara    |
| 28. 10. | Resumo pri INTERBABILADO.                        |                  |
| 7. 11.  | Glosoj kaj aforismoj.                            | - J. Werner      |
| 11. 11. | Rememoro je Boh. Martinů                         | - L. Čermáková   |
| 18. 11. | Poezio de aŭtuno.                                | - A. Zdražilová  |
| 25. 11. | Amuze pri famuloj.                               | - ERINACO        |
| 20. 12. | Vespero de instruaj filmoj.                      | - Dr. Kočvara    |
| 9. 12.  | Novaĵoj en ĉeĥa kaj Esperanta literaturoj.       | - Vl. Kočvara    |
| 16. 12. | ZAMENHOFA VESPERO okaze de 100-jara jubileo.     |                  |
| 23. 12. | Novaĵoj en elektrotekniko.                       | - Inĝ. J. Pastor |
| 30. 12. | Niaj korespondantoj rakontas.                    | - K. Vala        |



## INTERBABILADO INTERBABILADO INTERBABILADO

Tradicia INTERBABILADO en OSTRAVA

okazos ankaŭ nunjare. Aliĝojn akceptas ĝis 20. 10. Dr. Kočvara, OSTRAVA 8, Kamenec- 251/3.

PROGRAMO - SABATO 24 Oktobro:

19,00 Dr. Kočvara: La 44-a U. K.

DIMANĈO 25 Oktobro:

9,00 Inĝ. J. Werner: Esperanto - esperantismo - esperantistoj.

Dr. Kočvara: ĈEK kaj ĝia tasko. -

Diskuto. -

19,00 Teatraĵo de Z. Čapek kaj R. Kudla: "Esperantisto, ekesto kaj malapero" — prezentos satira ERINACO.

Poste amuzo kaj danco.

LUNDO 26 Oktobro:

8,00 Unua fakkunsido:

Instruado en SET. (VI. KOČVARA)

10,15 Dua fakkunsido:

Signifo de preso por nia laboro. (J. Werner)

Kiu postulas tranoktejon kaj event. viziton de la ferfabriko NHKG (dimanĉo posttagmeze), sciigu ĉiujn persojndatojn!

Krom la teatraĵo ĉiuj aranĝoj okazos en Ostrava-Vítkovice, Výstavní 97, "Zámek" - ZK VŽKG.

La teatraĵo okazos en Kulturdomo de la minejo Petr Cingr en Ostrava Michálkovic, apud lasta stacio de trolejbuso n-ro 54.

"BULGARA ESPERANTISTO" (Julio - aŭgusto 1959):

"Ĉu vi scias, ke en la tuta mondo 12 milionoj da homoj parolas Esperanton?"

### SEPTEMBRE EN RAJECKÉ TEPLICE.

En Rajecké Teplice, en tiu ĉarma kaj trankvila banloko, 15 km for de Žilina, renkontiĝis 12-13-an de septembro grupo de 46 esperantistoj el 15 lokoj, plejparte el Žilina, sed ankaŭ el Poprad, Martin, Košice, Ostrava, Třinec, Olomouc k. a. Sabate vespere sciigis nin pri siaj impresoj en la 44-a U.K. ges-anoj Milatová, Kabátek, Pomykacz kaj D. Kočvara. Poste ĉiu pasigis la tempon laŭplaĉe en promeno, kantado apud lageto, en kafejo kaj fine ĉiuj en agrablaj ĉambroj de la hotelo Velká Fatra. Dimanĉe ni ekskurse direktis al rokaro Skalka, kie ni interparolis sub gvido de D-ro Izák. La temo ne estis antaŭfiksita, sed ĝi povus titoli "Situacio kaj perspektivoj de nia preso". Posttagmeze kelkaj scivolemuloj gustumis kuracan banon? Post ĉies forveturo tamean restis io, nome forta deziro renkontiĝi en Rajecké Teplie en septembro 1960 denove.

La renkontiĝon aranĝis esperantistoj el Žilina.

### "KULTUR-KALENDARO DE NOVÉ ZÁMKY"

- septembra-eldono, dediĉas unu paĝon al informa teksto pri Esperanto kaj unu tutan paĝon al slovak- kaj hungar-lingvaj informoj pri aŭtunaj kursoj de Esperanto. El donanto: Dom. osvety (Domo de Klerigo), Nové Zámky, Slovakio.

"PIGMALIONO" RIPETATA. La artisma kolektivo de Esp. klubo en Praha "Verda Ĉaro de Julio Baghy" prezentis al la Universala Kongreso en Varsovio kun granda sukceso la teatraĵon "Pigmaliono" de B. Shaw. La prezentado estos ripetata en Praha (teatro Malá scéna, Ve Smečkách 26) sabate vespere 10. X.1959. Oni atendas viziton de esperantistoj el aliaj lokoj.

### EKSTERLANDAJ VIZITANTOJ en PRAHA.

Okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio vizitis nian landon multaj eksterlandanoj. Ekzemple en Praha haltis ĉirkaŭ 150 fremdaj esperantistoj el 14 landoj de Eŭropo kaj Afriko. Kelkajn el la renkontiĝoj, aranĝitaj de la Esp. klubo en Praha, ĉeestis reprezentantoj de la Kleriga Institucio kaj de la Ĉs.E-Komitato. – Praha atendas ankaŭ viziton de la konata japana esperantisto Kurisu, invitita de ĉs. oficoj.

jm

### BULGARIO – LANDO DE ROZOJ KAJ DE G. DIMITROV

En unuaj tagoj oktobraj vojaĝis el Pollando tra Ĉeĥoslovakio bulgara pedagogo kaj konata esperantisto Simeon Hesapĉiev. Li prelegis en kelkaj urboj laŭlonge de vojaĝlinio Varsovio - Sofio, ekzemple en Karviná: Ostrava, Olomouc, Bratislava, Nové Zámky. Li parolis pri la Universala Kongreso, pri E-movado en Bulgario kaj Pollando, pri porpaca servo de la Internacia Lingvo kaj precipe pri sia bulgara patrujo, lando de rozoj kaj Georgi Dimitrov.

## **LA MOVADO eksterlande**

### ZAMENHOF-STRATO EN KAUNAS.

Fine de la artikolo "Zamenhof en Litovujo" en 'la 2-a n-ro de "Fajrero" estas menciite, ke ekde la jaro 1926 ĝis la germana okupo estis en Kaunas Zamenhofa strato (strato, en kiu loĝis s-ro Zilbernik, bopatro de D-ro Zamenhof), kaj ke ĝi ankoraŭ ne estas renomigita.

"Kauno Tiesa" (Vero de Kaunas) en la 146-a n-ro (21. 6. 1959) informas, ke "Laŭ decido de la Urba Plenum-Komitato la Alytaus-str. estis nomita je Zamenhof-strato".

### ESPERANTO EN ALBANIO.

S-ano Cefo Fico dufoje prelegis pri Esperanto kaj organizis malgrandan ekspozicion en la kulturdomo en Tirana. En la Ministerio de konstruado funkcias Esperanto-kurso, kiu eldonis stencilitan lernolibron, verkitan de s-ano Cefo Fico. La albana E-movado bezonas esperantaĵojn, lernolibrojn en itala, franca aŭ rusa lingvoj. La adreso: S-ano Cefo Fico, inĝeniero ĉe la Ministerio de konstruado, TIRANA, Albanio.

### MIL HUNGARAJ GEKNABOJ AŬDIS PRI ZAMENHOF.

Honore al la Zamenhofa restjaro, laŭ aranĝo de Esperanta fakrondo "Konkordo" en Budapeŝt, s-ano Pál Balkányi, repr. de MEM, faris dum la somero prelegojn pri la vivo kaj verko de Zamenhof, menciante la kulturan aspekton, infanan korespondadon kaj pacmovadon, en 12 tendaroj de 7 ĉefurbaj distriktoj, sume al 1000 geknaboj. Duloke la paroladon akompanis lumbildoj, en dek lokoj li aranĝis rapide ekspozicion, kiu ĉiam vekis intereson ĉe granda parto de la infanoj kaj pedagogoj.

La geknabojn plej multe interesis la klarigo pri pacagado per Esperanto, sciigo pri efikoj de la atombombo en Hiroŝimo, la pretigo de papergruoj, el kiuj unu ekzempleron li montris, kaj la starigo de statuo pri mortinta japana knabino; bildojn sendis Jui Ĉunoŝin el Nagoja. Li ankaŭ parolis pri utilo de la ĉeĥoslovakaj someraj tendaroj esperantistaj.

### GELERNANTA RIPARISTA BRIGADO "ESPERANTO"

En la II-a gejunula gimnazio "K. Veliĉkov" en Pazarĝik, instruisto pri matematiko, k-do Petko Arnaudov kun 7 knaboj kaj 9 knabinoj prenis sur sin la taskon fari la ĝeneralan riparadon de la lernejo. La gejunuloj fondis la brigadon "Esperanto" kaj dum laboro perfektigis en la Internacia Lingvo, ĉiutage post la laboro okazis speciala kurso por la novaj esperantistoj, dimanĉe la brigado ekskursis, kolektive oni legis en Esperanto la bonegan libron de J. Rosbah "Bagatelaro". La brigado ankaŭ anoncis konkurson al ĉiuj gelernantaj brigadoj en la departemento Pazarĝik.

La neta ekonomia efekto estas 32.426 levoj, nekonsiderante la edukadon laboron por la gelernantoj kaj la egan kreskon de la prestiĝo de Esperanto en la departemento.

Laŭ "Bulgara Esp-isto" 7-8.

-----  
EN LA UNIVERSITATO DE OXFORD ESTIS NUN LIKVIDITA DEVIGA INSTRUADO DE LATINA LINGVO.  
-----

### VIETNAMA KONTRIBUO AL LA ZAMENHOFJARO.

Ŝtata Fremdlingva Eldonservo kunabore kun Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio aperigos tri librojn: "Amika Vietnamio" de Len Fox, "La unuaj tagoj de nia batalo"- kolektra de kelkaj noveloj kaj "La vivo de Ho-Chi-Minh".

La ŝtata radiostacio "Voĉo de Vietnamio" enkondukis fine de 1959 disaŭdigojn en Esperanto.

### FONDIĜIS KOREA ESPERANTO-ASOCIO.

11.4.1959 fondiĝis Korea Esperanto-Asocio. Ĝia celo estas disvastigi Esperanto-movadon en popoldemokratia Koreo kaj kontribui al la mondpaciga afero. La adreso: S-no Rig Gin, ĝen. Sekretario de Korea Esperanto-Asocio, ĉe Scienca Akademio, Pjengjano, Koreo.

### ESPERANTO EN MEDICINO.

La ĵurnalo de Fiziologia societa de Japanio publikigas en sia 19-a kaj 20-a volumoj plurajn sciencajn artikolojn kun resumoj en Esperanto, ekzemple "Influo de trafluigado kun rektangula pulsokurento sur sojlo kaj agada potencialo de nervo" de Prof. Sato-Jiro, "La tria efiko de trafluigaj elektrodoj sur la kontrakada leĝo" de Prof.

Sato-Huruyosi k. a.

### ĈU ESPERANTO-KATEDRO EN RIO DE JANEIRO?

La Konsilantaro de Rio de Janeiro pridiskutas leĝoprojekton pri kreo de katedro de Esperanto en la oficialaj lernejoj kaj fakultatoj filozofiaj de la komunumo. La projekto rekonas la progresojn atingitajn per la vortoj, ke Esperanto "prenos la rolon de la latina lingvo en la mezepoko". Laŭ "Rio Esp." 46-47

### ESPERANTISTA EDUKEJO EN BRAZILO.

Ekde 1950 ekzistas en la brazila Jacarepaguá "Educandário Esperantista". 350 knabinoj, filinoj de malriĉaj gepatroj kaj orfinoj tie lernas diversajn virinajn laborojn, ekz. kuirarton, kudradon, teksadon de tapiŝoj, ornamaĵojn k.a. De la urbestro ĝi nun ricevis subtenon 12,600.000 kruzeroj. Kiam estos preta nova trietaĝa konstruaĵo, kreskos la nombro de lernantinoj je 650.

La lernantinoj de "Esperantista Edukejo" dua plantado de arbo, simbolo de amikeco, akceptis eĉ D-ron Sucarno, preeidanton de Indonezio, akompanatan de la ministro de agrikulturo kaj de reprezentanto de la Brazila ŝtatestro.

### LA HOMO DE LA VERDA STELO.

en hispanlingva originalo "El hombre de la estrella verde" estas titolo de nova teatraĵo, verkita de profesia verkistino Blanca Irurzum omaĝe al la Zamenhofa Jaro. La verko estis legita de la aŭtorino mem en la kunveno de Bonaera Esperanto-Asocio en Buenos Aires 30.5.1959. (La disponigo de la verko en Esp. traduko al la esperantista publiko certe utilis!).

### AFIŜKONKURSON OKAZE DE LA ZAMENHOFA JARO

okazigis la argentina "Escuela Agencia de Publicidad".

### PER ESPERANTO POR LA PACO.

S-ro H. Steiner, direktoro de la Internacia Esperanto--Muzeo en Vieno estis honorigita per ordeno de la I-a klaso de Germana Federacia Respubliko por elstara laboro, kiun li dum dekjaroj fapis per Esperanto por proksimigo de nacioj kaj por la paco.

### BULGAROJ PREZENTAS AL LA MONDO DU JUVELOJN

de sia literaturo en Esperanto; 326-paĝa "Bofilino" de G. Karaslavov (eldonkvanto: 5000) kaj "Sub la jugo" de Ivan Vazov. – Ĉu tio ne povas esti instigo por Ĉeĥoslovakio? jer

### LA POLA MARŜIPO "ZAMENHOF"

estis elkonstruita en Split (Jugoslavio). Ĝi estas 154 m longa, 19 m larĝa kaj havas 12.800 tonelojn.

NI DISKUTAS PRI LA INFORMADO - la enketo estos fermita en la 5-a numero. Bonvolu ankoraŭ sendi viajn kontribuojn! RED.
--

# Somera Esperanto Kolegio en Lázně Bělohrad

12-25 Julio 1959

Certe multaj ankoraŭ rememoras kaj neniam forgesos nian iaman "Esperantujon" en Doksy. Do Bělohrad estas ĝia daŭrigo. Dank' al la oferemaj s-anoj Pytloun kaj Vinčálek la preparo estis finita en du monatoj kaj la kolegio sukcesis.

Ĉeestie 60 p. el diversaj lokaj de la respublika (de Aŝ ĝis Košice). La lernejo estis en la tama kastelo, kie okazis A,B,C kursoj - (C-kurso havis nivelon kiel D). Instruis s-anoj Slanina, Lukáš, Kraft kaj Hromada. - La ideologiajn prelegojn havis D-ro Jermář. Posttagmeze okazadis en la bela parko apud la kastelo interesa oratora kurso gvidata de s-ano Slanina. Tuj apud la kastelo troviĝas Kultura Domo (Banurba hotelo), kie la plejparto el ni loĝis, kie ni ĉiuj manĝis kaj amuzis nin.

Dum la unua semajno la vetero estis kontentige bela, multaj ĝuis posttagmeze la trankvilon de la agrabla banloko kaj promenis en la granda parko nomata "Fazanejo", kiu kun multaj kaŝitaj benkoj logis junajn parojn aŭ dancemulojn, ĉar trifoje en semajno estis eble danci sub la ĉielo. Sufiĉe bona estis ankaŭ banado en la fiŝlago.

Dimanĉe la 19.7. la acera aleo de la plej bela strato en Bělohrad estis denove nomita "Aleo de D-ro Zamenhof" (1a unuan fojon antaŭ 24 jaroj). La solenan malkovron de la strat-tabulo ĉeestis ĉ. 100 p. Parolis la simpatia prezidanto de la Urba Komitato (MNV), D-ro Jermář kaj s-ano Klůz.

Sed la sankta Petro ĉagrenis nin, kaj dum la dua semajno pluvetis kaj estis malvarme. Tamen okazis sukcesa ekskurso al Bohemia Paradizo, vizito al la loka muzeo, al la ekspozicio "100 jaroj de Bělohrad", al la memordomo de la verkieto K. V. Rais k. a.

La vasta restoracia salono de la hotelo estis je nia dispono la tutan posttagmezon kaj vesperon. Vespere ni havis tie programojn amuzajn, preparitajn de la kursanoj, kaj gvidatajn de s-ano Slanina. S-ano Klůz tie prelegis pri sia partopreno en la scienca ekspedicio al Islando en 1948 (kun filmo). Ofte ni kantis kaj dancis. Al Bělohrad venis ankaŭ eksterlandanoj. Ĉu vi ne kredas? Jes, vendrede antaŭ la adiaŭo vizitis nin hindoj, hispaninoj kaj multaj aliaj fremduloj, plejparte nerekoneblaj, ĉar multaj havis kovritajn vizaĝojn. Estis ja nia somera karnavalo kun moda revuo, bona amuzo kaj danco ĝis noktomezo.

Ĉiuj tagoj enhavis ian amikan atmosferon kaj sekve ni ĉiuj sentis nin en nia rondo familia bone kaj agrable. -

Sabate ni adiaŭis, sed ni certe ne forgesos la bele travivitajn tagojn en nia nova "Esperantujo" kaj deziras al Bělohrad por la venonta jaro pli belan veteron kaj ĉefe, denove multe da sukceso.

Valešová

## SOMERAJ ESPERANTO-TENDAROJ

### IOM DA STATISTIKO PRI SET 1959:

En Lančov partoprenis la kursojn 76 p., en Červená n/Vl. 68 p., entute 144 (inkluzive de 15 personoj, kiuj venis nur por kelkaj tagoj).

El la baza nombro 129 kursanoj estis: 47 lernantoj kaj studentoj, 30 laboristoj,

26 administraj kaj teknikaj laboruloj, 9 instruistoj, 4 flegistinoj, 13 en diversaj aliaj okupoj.

Meza aĝo de kursanoj estis 23 jaroj.

Instruis 16 ges-anoj.

SOMERAJ TENDAROJ, niaj gloraj SET, atingis nunjare sian 8-an jaraĝon. Eltrovitaj de bravaj kaj iniciatemaj (nun sole bravaj) opavanoj, SET fariĝis nia "fonto de fiero" aŭ nuntempe prave "kaŭza principo de esperantista, junularo en ĈSR".

Eble kelkaj legantoj de "Fajrero 3" trovis la "Tendaran pelmelon" satira, primoka. Konsciuj, ke PELMELO neniam estas oficiala, ĝi enhavas voĉojn de subo, vortojn spicitajn ofte per knabaĉa humuro. Kaj ĝuste la spico kaj bonhumoro konservas la rememorojn, la elanon, la edukajn, atingiĝojn de la tendaraj kursoj, ne la kursoj mem, kvankam eĉ pri la instruado kaj ekzamenoj multaj rememoras, kiel ekzemple aŭtoro de la jam publikigita

GRANDPOEM' PRI VIV' SENPENA

EN TENDARO DE ĈERVENÁ,

tendarano G.P. , kiu sendis al ni ankoraŭ kelkajn kompletigojn. Jen ekzemple du enkondukaj strofoj:

Post kiam mi forlasis la limon de l'tendaro,  
alvenas mi por danki, kiele mia ŝuld',  
portante rememoron pri l' festo de ĉi jaro,  
pri la momento hela en griza vivtumult!.

Mi ne deziris ridi nek volis mi eĉ plendi  
en la versaĵo, kiun fluganta naskis hor',  
mi ne intencis iun primoki nek ofendi,  
nur travivitajn tagojn konservi por memor'...

Kaj nun sekvu la kompletigan fragmenton pri  
kurso:

Pri la lernantoj diri  
ni povas nur – sen tiri  
tro longe la poemon -  
ĉi siluetan skemon:  
komence nia stato  
estis en ver' "por kato",  
kuniris senkonsole  
kvin gelernantoj sole.  
Laŭgrade tamen ade  
aperis tendarpade  
dum tagoj pli malfruaj  
adeptoj novaj pluaj,  
sen dub' neniam nuloj

sed freŝaj fervoruloj.  
Ekestis nun diskuto  
scienca kaj disputo  
kaj fine preskaŭ skismoj  
pri la neologismoj,  
pri la esprimoj "mal"-aj  
kaj neoficialaj,  
pri vortoj diferencaj,  
identaj, precedencaj  
kaj apartaĵoj sencaj.  
La vortbatal' verfakte  
ruliĝis katarakte.  
Ni ankaŭ solvis guste,  
ĉu taŭgas "ĵus" aŭ "ĝuste".  
Pri l' esprimari' diversa  
en ĉi rakonto versa  
ne eblas plu daŭrigi  
kaj ĝin en versojn ligi,  
kvankam vin eble distrus,  
se ion ni registrus.  
Bedaŭre mankas rimoj  
pri tiuj ĉi esprimoj!

Ankaŭ la ekzameno restis en memoro de la aŭtoro:

Fin' kursa kiam venis,  
nin oni ekzamenis  
severe, senkompate  
kaj ĉiun separate.  
Do l' ekzamen' rigora  
kiel ia doktora!  
Pro la rezulto justa  
aranĝo estis ĝusta,  
ke ni eltiris spritajn  
demandojn du, skribitajn  
surkarte, por ke ĉiu  
antaŭe ilin sciu.

Sed de l' hazard' dependis  
tamen, ke iu vendis  
konetojn siajn poste  
kompare multekoste.  
La instruistojn tedis,  
ke unu el ni cedis,  
kiu parolis multe

kaj eĉ neniel stulte.  
Kaj fine ili jesis,  
ke ĉiuj ni sukcesis  
ĉe tiu ekzameno.  
Jes, kelka eĉ sen peno  
(vantec' ĝin diras tenta)  
kun noto eminenta.

Al la temo de Someraj Esperanto-Tendaroj ni ankaŭ estonte revenados sur paĝoj de "Fajrero". Ni do atendas, ke la partoprenintoj konstante kontribuos la redakcion per siaj verkoj.

En nomo de la partoprenintoj en SET el nia regiono de Ostrava ni sincere dankas al la nunjaraj tendar-aranĝantoj por la bone farita laboro: Esperanto-rondeto de ZK ROH Jitex, PÍSEK kaj Esperanto-rondeto de la Distrikta Domo de Klerigo en TŘEBÍČ.

---

## KIO ESTAS LA HOMAJ RAJTOJ

"Kio estas la homaj rajtoj? Ili apartenas al vi, kiel al ĉiuj. Ili ne estas donacoj aŭ leĝoj, sed vi heredis ilin kiam vi naskigis kaj ili nun apartenas al vi kia ajn estas la koloro de via haŭto, via religia kredo aŭ via politika opinio." -

Ĝi estas teksto, kiu en Esperanto akompanas afiŝon eldonitan de UNESCO kaj disvastigitan en ĉiuj landoj de la mondo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO estas "En Konsultaj Rilatoj kun UNESCO".

## LEKANTETO

Karaj infanoj!

Hodiaŭ anstataŭ fabelo ni alportas al vi artikolon de 14-jara Liduška Panská el Jihlava, kiu estis nunjare somere en esperantista tendaro:

### VIVU ESPERANTAJ TENDAROJ!

Antaŭ kelkaj tagoj mi revenis el Somera Esperanta Tendaro en Červená. De tiu tempo mi senĉese rememoras belegajn travivaĵojn en la tendaro. Mi volas ion rakonti pri SET al vi, kiuj ankoraŭ ne partoprenis iun Esperantan tendaron, por ke vi povu imagi, kiel bela kaj gaja estas la vivo en ĝi. Kaj vi, kiuj jam partoprenis, certe konfirmos miajn vortojn!

Mi kaj mia amiko el nia klubo en Jihlava decidis, ke ferie ni partoprenos iun Esperantan tendaron. Ĉar la tendaron en Laňčov ni ambaŭ jam pasintjare partoprenis, ni decidis, ke prefere ni vizitos la tendaron en Červená nad Vltavou. Ni veturis jam sabate, kvankam la komenca tago estis dimanĉo. Ni alveturis en la vilaĝon Červená kaj piede ni iris laŭ signoj en la tendaron. Dumvoje ni ekvidis iun tendaron, sed ĝi ne aspektis kiel la Esperanta. Do, ni iris plu kaj subite ni vidis alian tendaron, situantan sur bela bordo de la rivero Vultavo. Ni laŭte vokis trans la riveron: "Estas tio



Esperanta tendaro?" El la tendaro tuj alvenis tendaranoj kun ŝipeto kaj transportis nin en la tendaron. Tie ne estis multe da homoj, ĉar partoprenintoj de la unua etapo jam forveturis.

Venonttage alveturadis pluaj geknaboj. Ni ĉiujn bonvenigadis, kiel jam malnovaj tendaranoj. Ja ni jam travivis en la tendaro unu nokton! Mi estis la plej juna - 14-jaraĝa - tendaranino!

Lunde komenciĝis lernado de historio, literaturo kaj gramatiko kaj. . . ĉasado de Verda Kastoro: 24 horojn paroli nur Esperante!

Ĉiutage frumatene komenciĝis la tendara vivo: gimnastiko, lavado en la rivero, hiso de la flagoj kaj bongusta matenmanĝo. Poste komenciĝis la instruado. Posttagmeze ni aranĝis diversajn ekskursojn aŭ ludojn por pliinteresigi la tagprogramon. Neforgeseblaj travivaĵoj estis, kiam ni sidis ĉirkaŭ la tendarfajro kaj niaj kantoj resonis tra la nokto. . . Tiel pasis preskaŭ du semajnoj. Kaj venis antaŭekzamena tempo. Ĉiuj diligente lernis, por ke la ekzameno finiĝu kiel eble plej bone. Kaj finiĝis vere bonege. Venis sabato, la tago plena de ĉirkaŭpretoj, kisoj kaj adiaŭoj - tendaranoj forveturis. En la tendaro ni restis nur ses. Fine ankaŭ ni, lastaj, forveturis, dimanĉe per antaŭlasta vagonaro, kiam ni ankoraŭ bonvenigis novajn tendaranojn.

Adiaŭ, nia tendaro, en kiu ni travivis multe da belegaj momentoj! - Adiaŭ, kaj baldaŭ ĝ i s r e v i d o !

### INFANVERSETO PRI LA ELEFANTO POR MIA NEPETO

Manĝu panon, mielon,  
avo diros fabelon  
en la lingvo Esperanto  
pri la granda elefanto,  
kiu longan rostron havas,  
per ĝi sian kapon lavas.  
Por ĝi ne ekzistas baro,  
trunkon portas el arbaro.  
Saĝa kaj bonvola besto  
portas princon dum la festo,  
sed ne sentas ies pikon,  
mortopremas malamikon.  
Sian mastron en danĝero  
ĝi defendas kun ofero,  
kial havas grandan famon,  
kaj meritas nian amon.

(El la kajero de la onklo Paŭlo el Budapeŝto).

# FLUAS AKVO FLUAS JEN

Ĉeĥa popolkanto (Teĉe voda z javora).

Esperantigis J. Cink.

1. Rivereto fluas jen  
ĉe knabino en ĝarden'  
da hej hej juĥaĥa,  
ĉe knabino en ĝarden'.
2. Naĝas knaboj en river'  
vokas Anjon al ekster'.
3. "Ho, eliru, junulin',  
la knabar' atendas vin!"
4. "Mi ne povas for el dom',  
estas de l' patrin' ordon'.
5. Por mi ne plu gravas vi,  
knabon dome havas mi!"

J. MAREK:

## A T I N G I T A !

Luno atingita  
per glora raketo!  
Atingita! -gita!  
Mi kun kaliketo  
gratulas.

Ora Lun' palvanga,  
man' home vin tuŝis!  
Ĉi inform' lavanga  
la mondon priduŝis  
kaj giras.

Luno atingita!  
Orhara knabino  
tuj en kor' venkita  
min kisas sen fino,  
adoras.

Luno kapreola,  
salut' jen amika!

Via lumo mola  
en vitro kalika  
tremetas.

Luno kapklinita  
rebrilas en vino.  
Mia am' venkinta  
en kor' de virino  
reeĥas.

## LINGVA ANGULETO

En la Esp. Renkonto en Třinec (5.7.1959) ne estis elektita laŭ kutima maniero la lingva observanto, tamen kelkaj parolintoj eraris en la lingvo. Ekzemple mi notis:

1. "aliĝita" neniam povas ekzisti, sole ALIĜINTA, – aktiva formo.
2. "pere Esperanto" estas erara kunligo. La ĝusta esprimo estas prepozicie: PER ESPERANTO aŭ PERE DE ESPERANTO.
3. "aliĝi vin" ne havas sencon, "aliĝi" ja estas netransitiva (sen rekta objekto). La ĝusta formo: ALIGI VIN.
4. "komencis majo" ne, sed KOMENCIĜIS MAJO, ĉar la "komenci" estas transitiva verbo (komenci ion).
5. "Dankon!" - "Mi petas!" - ja kion mi petas? La ĝusta respondo estas NEDANKINDE/A/!
6. "daŭris tri semajnoj". Kiel longe? Tri semajnoj! – la akuzativo de daŭro.
7. "la Esperanto". Simile kiel ĉe la personaj kaj geogr. Nomoj oni ne uzu art.: ESPERANTO.

J.W.

## R E C E N Z O J

"DEK KVIN JAROJ DA POPOLA REGADO EN BULGARIO", aperis la Eldonejo de Fremdlingva literaturo en Sofio en la jubilea jaro 1959. 94 paĝoj, A-5-formata, broŝurita, liverata de: Bulgara Esperantista Asocio, Poŝtkosto 66, Sofio, Bulgario.

Ekde la 9-a de septembro 1944, ekde tiama renverso de la manarko-faŝisma regado, la bulgara popolo sub gvido de la Komunista Partio iras sur la vojo de potenca leviĝo kultura, ekonomia kaj politika. Bulgario, lando antaŭ 15 jaroj agrikultura, transformiĝis en progresintan industri-agrikulturan landon. Kompare kun la jaro 1939 produktado de la elektra energio kreskis 10-oble, de nigraj metaloj 35-oble, de koloraj metaloj 113-oble ktp. Laŭ konsumado Bulgario antaŭas siajn

kapitalistajn najbarojn. En 1939–1940 studis en la altlernajoj 10.169 personoj, en 1956-57 jam 56.705 personoj.

La broŝuro entenas multajn interesajn priskribojn, komparojn, statistikajn informojn. Ĝi estas leginda kleriga dokumento. jer

"EKSKURSO EN NOMBROJ" de F. Emerson Andrews, 14-paĝa, po unu ekz. Senpage ricevebla de The Duodecimal Society of America, 20 Carlton Place, Staten Island 4, N.Y., USA.

Resuma historio de kalkulado kaj plendo pri malfeliĉa elekto de la nombro-sistemo bazita sur 10 (dek fingroj), kiu estas nur dufaktora, kaj propono de la kvarfaktora bazo 12. Por 10 kaj 11 estas proponitaj novaj simboloj. Tiun ĉi sistemon la aŭtoro subtenas per pluraj argumentoj, ekz. Angla-usonaj mezur-unuoj, la ĝenaj bagatelaĵoj de la decimala sistemo estas trotaksataj, pro tio la verketo impresas tro propagandece. Malgraŭ tio mi agnoskas la duodecimalan sistemon konvena, sed ĝia apliko alportus komence pli da malutilo ol utilo. La akirota divideblo de la bazo (faktorebleco) estus neimageble multekosta kaj kiel kriterio ĝi ne igas refermemulojn unuecaj) estis jam proponitaj la bazoj 2, 8, 16 1/. jer

"VIETNAMIO ANTAŬENŜAS" - El la 1-a n-ro: "En la kadro de trijara plano (1958-1960) 7 novaj modernaj entreprenoj estas konstruataj en provinoo Phu-Tho: unu elektra uzino, unu fabrikejo de ĥemiaj produktoj, unu uzino de superfosfato, unu brikfabrikejo, unu sukerfabrikejo, unu rizsenŝeligejo, unu paperfabrikejo."

Vietnamio antaŭenmarŝas" estas revuo pri la vietnamaj kulturo kaj socio, pri politiko kaj ekonomio. Al esperantistoj ĝi speciale dediĉas Esperanto-rubrikon. Per atentigoj kaj mendoj helpu elpostuli la peradon de tiu ĉi valora kvaronjara revuo de: ORBIS n.p. Praha 12, Stalinova 46.

ESPERANTO-GRAMATIKO POR HUNGAROJ sur 5 paĝoj de duobla poŝtkarto, konata jam en eldono ĉeĥ- kaj slovak-lingva, aperis nun en Nová Zámky, Slovakio. Prezo: 1 ekz. - 1 Kčs.

---

---

## ANONCETOJ

LEO G. FIŜBEJN, mineja inĝeniero, goros UZLOVAJA, Tulskoj oblasti, ulica Pervaja Daĉnaja 42, kv. 9., USSR, serĉas seriozan ĉeĥan kunlaboranton en IPTS, kiu por li tradukus interesajn artikoletojn kaj rakontojn el nuntempa vivo de ĉs. Ministoj, precipe el la gazeto "Ĉs. Horník".

JUNAJ INSTRUISTINOJ dez. Kor. Kun ĈSSR: SSSR, Tbilisi, ul. Purceladze 3, Dom Uĉitelja, Esperanto.

ARISTARKOV K. Leningrad – D 40, Poŝto. Do vostrebovania, USSR – dez.kor. Kaj intŝ. Alumetetiketoj kun t.m.

HUNGARAJ GEEDZOJ dez.kor. Kun esp. el ĉ.l. pri ĉ.temoj: Eged Gyuláné, Budapest IX, Ferenc Kösut 12, F 3, Hungario.

INTERŜANĜON de alumetetiketoj, bildkartoj, razkling-kovertetoj, paperaj buŝtukoj, florsemoj ktp. tre deziras la ĵus fondita: "ZAMENHOF" – Junulara Esperanto Fakrondo, Budapest XI, Fehérvári ut. 47, Kulturház, Hungario. (La Rondo

planas internacian kampadon de esp. gejunuloj).

ALVOKO AL LA FOTOAMATOROJ. Per fotografaĵoj kulturi amikecon inter junuloj de ĉiuj kontinentoj, organizi informan servon per Esperantaj gazetoj, aranĝi fotoekspoziciojn, konkursojn – tio estas celo de nove fondata "Internacia Ligo de Esperantistoj Fotoamatoroj". La adreso: Organiza komitato de ILEF, Budapeŝt 119, Poŝtkesto 6, Hung.


POR EKSPOZICIA CELO sendu fotojn, afiŝojn, desegnaĵojn pri infanaj kaj gejunulaj Esperanto-kursoj, tendaroj, kunvenoj, teatraj prezentadoj. Rekompence mi sendas Esperantan bildprospekton. Adresu al: P. Balkányi, Budapeŝt II., Phkart, Haraszt-at. 33, Hungario.

"LA PROGRESANTO" (Nederlando), n-roj: 1953: 1,2,3; 1954: 2,6,7 kaj 1957: 6,7 estas urĝe bezonataj. Proponojn sendu al la redakcio!

---

## ENIGMA KURSO

Facila estas kreado kaj solvo de enigmo, kiu nomiĝas ANGULENIGMO. Ĝi iomete similas al krucenigmo, sed ĝi estas malpli ampleksa kaj pli simpla. Vidu ekzemplon:



konsciiĝi  
malamuzi  
pluvofonto (r)  
korelativa radiko  
infinitiva finaĵo

Solvo: SENTI  
ENUI  
NUB  
TI  
I

Kiel vi vidas, la solvitaj vortoj estas sinsekve je unu litero malpli longaj kaj devas egali horizontale kaj vertikale.

Kaj nun ekzercu vian cerbon kaj ankaŭ iom ripetu:

1. ANGULENIGMO: . . . . . ĝi laboras anst. homo  
. . . . . kiel gustas citrono?  
. . . . . naĝilo  
. . . . . posteulo  
. . . . . negacio  
. . . . . substantivo

2. SUPERSIGNUMO: Historio nin konvinkas ofte,  
ke mono kaj . . . . .  
naskas multe da . . . . .

3. ANAGRAMO: LUU JARON

Solvoj en la venonta numero.

J. Cink

-----  
NI DANKAS AL NIAJ SUBTENANTOJ: J. Škařupa, Praha – 3, J. Kakrda, Pardubice – 8, F. Pavlík, Ostrov n/Ohří – 8, V. Michálek, Brodek u Př.-8, V. Vantuch, Ostrava – 3, EK Brno – 3, Z. Bednář, Rychnov n/Kn. - 3, L. Zapletalová, Pardubice – 3, J. Vítovec, Vodňany – 3, Knybel, Rychvald – 3, A. Volková, Břidličná – 3, Vandlíček, Aš – 3, MUDr. J. Černý, Litoměřice – 8, J. Duda, Újezd – 3.

J. Mevo:

"INEMOZO MEZEŬROPA"

Ĝin ekspliki?

Kial tro kompliki?

Kial tiri en disputon

la edzinan jupon?

Ja ne temas pri malsaninklino,

pri moral-idea fino,

aŭ viktim' de vino,

sed Schwartz-isma jen deliro:

la "edzino – fino". -

Edzoj kaj edzinoj!,

karaj paĉjoj kaj patrinoj!

ĉu ne estas dece

agi plue respondece?

El aforismoj de J U L I A N T U W I M:

Ne mirigis min tio, ke astronomoj malkovris diversajn planedojn, sed tio, kiel ili certigis pri ties nomoj.

Julio estas monato, dum kiu ni ne povas en tramo malfermi la fenestrojn, kiuj ne estis fermeblaj en januaro.

Vagabondo estas homo, kiu havus de turisto nomon, se li posedus nomon.

Trad. -jer

FAJRERO estas bulteno de junaj esperantistoj en Ostrava-regiono, Ĉeĥoslovakio. Aperas laŭbezone.

OKTOBRO 1959 – n-ro 4.

ELDONAS: ZK ROH Třineckých železáren VŘSR – Esp. odbor.

REDAKTAS: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner (responda)

RED. ADRESO: Fajrero, OSTRAVA 15, Na Lachu 6, ĈSR.

ADMINISTREJO: VI. Kočvara, OSTRAVA 8, Kamenec 251/3.

Ĉi n-ron ILUSTRIS: Inĝ. ark. M. Kalný Jer.

p.k.n-ro T 42830